

Hector Hodler, 13-a parto
La evoluo iras al Hector Hodler kaj forlasas Louis de Beaufront
Claude Gacond, 356-a radioprelego, 1970.08.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

A.- Hector Hodler konsciis, ke kun la multiĝo de la specialigitaj kongresoj komenciĝas nova epoko en la historio de esperanto. Finiĝas la pure teoria periodo. Malfermiĝas la tempo de tuja uzado. En septembro 1907 li skribis :

Cl.- *« Tro multaj [esperantistoj] estas ankoraŭ ekskluzive priokupitaj de la predikema propagando, kaj ne atentis pri la nova periodo, kiun komencis nia movado. »*

A.- Similan parolon vi neniam trovos en la buŝo de Louis de Beaufront, tipa reprezentanto de la pure propaganda periodo.

Cl.- La ligiteco de Louis de Beaufront al esperanto estis ĉefe prilingva. La ligiteco de Hector Hodler al esperanto estis multe pli profunda kaj ĉefe ideologia.

A.- Dum kelkaj jaroj la fluo de la evoluo iris tra Louis de Beaufront. Tiam de Beaufront, kiu plej talente personigis la ĝeneralan sintenon de la esperantistaro, estis kvazaŭ blinde obeata de la aliaj adeptoj de esperanto. Sed la internacia lingvo de Zamenhof, kaj tio ĉefe dank'al la laboro de Louis de Beaufront, tion ni ne forgesu, rapide disvolviĝis.

Cl.- Junuloj estis varbitaj, kaj tio en la periodo, kiam esperanto travivis veran okulfrapan ekspansion. Tiuj junuloj : Hector Hodler, Edmond Privat, Harold Bolingbroke Mudie, Paul Berthelot, Théophile Rousseau, kies nomojn ni ofte prononcis dum nia prelegaro, kiuj esperantiĝis inter 1900 kaj 1905, troviĝis antaŭ entuziasmiga situacio. La lingvo estis sufiĉe disvastigita, por ke oni povu eksongi ĝin uzi por praktikaj celoj.

A.- Dum Louis de Beaufront ĉefe alfrontis propagandajn problemojn, inter ili la antaŭjuĝojn de la franca klerularo rilate al la demando mem pri internacia lingvo, la nova generacio ĉefe alfrontis organizajn problemojn.

Cl.- El tio rezultas du kontraŭaj sintenoj. Ambaŭ grupoj - ni ne forgesu, ke Louis de Beaufront ne estis sola - ambaŭ grupoj havas proprajn tipajn reagojn koncerne al la samaj eventoj.

A.- Por Louis de Beaufront kaj la aliaj propagandistoj, se esperanto ne pli rapide progresas, la kaŭzo devas troviĝi en lingvaj mankoj. La ĉapelitaj konsonantoj malhelpas la presan uzon de esperanto. Iu procento de nelatinaj radikoj malfaciligas la tujan komprenon de teksto far latinistoj. La slava influo en la frazkonstruo kondukas al vortordo fremda al la francoj, kiuj estas la plimulto kaj komplikigas la vidalvidan tradukkomparon tiom ŝatatan de Louis de Beaufront.

Cl.- Por Hector Hodler kaj la junaj praktikantoj, se esperanto ne pli rapide progresas, la kaŭzo ne devas esti serĉata en la lingvo mem, sed en la anarkia organizado de la esperantistoj. Kiam dank'al pli perfekta kaj pli kompleksa organizo la esperantistoj povos ekuzi sian lingvon por komercaj, turismaj kaj kulturaj celoj, tuj la presejoj fandos la supersignitajn literojn proprajn al la esperanta alfabeto. Tuja kompreno de teksto ne estas ebla por ĉiuj. Normalas, ke la francoj lernu la ĝermanajn kaj slavajn radikojn, tio estas elementa egaleco, ĉar la slavo kaj ĝermanoj devas siaflanke lerni la latinidajn, kiuj estas multe pli abundaj. Por tiuj, kiuj povis tuj legi bonstilajn verkojn en esperanto, la frazkonstruo ŝajnas sufiĉe hejmeca, eĉ se ĝi tre malsimilas de tiu de la propra nacilingvo.

Hector Hodler, 13-a parto
La evoluo iras al Hector Hodler kaj forlasas Louis de Beaufront
Claude Gacond, 356-a radioprelego, 1970.08.05 & 08

A.- En ĉiu socio la homoj, kiuj plej forte personigas la ĝeneralan penson kaj kiuj kapablas esprimi la latentan celadon, fariĝas steluloj aŭ gvidantoj. La fluo de la evoluo iras tra ili. Sed ekde la momento, kiam ili ne plu personigas la ĝeneralan penson kaj ne plu kapablas esprimi la latentan celadon, tiam ili perdas sian gvidpovon super la aliaj samtempuloj.

Cl.- Tiu perdo de la gvidpovo estas vigle sentata de la gvidintoj. Ĝuste ĉar ilia penso ne evoluis, ili ne kapablas kompreni, kial la gvidatoj ilin ne plu sekvas. Ofte ili eĉ ne konscias, kial ili estis elektitaj kiel gvidantoj, pro tio ili ne povas percepti la sociajn ŝanĝojn, kies suferantoj ili estas. Ili ĝenerale provas restarigi la kondiĉojn, kiuj ekzistis, kiam ili havis la gvidpovon.

A.- Louis de Beaufront perdis la gvidpovon, kiam oni ĉesis konsideri esperanton kiel traduklingvon kaj komencis ĝin senpere uzi. La unua Universala Kongreso de Bulonjo-sur-Marco en 1905, kiun li fakte ne ĉeestis, anoncas gravan socian ŝanĝon en la esperantistaro. De lingvo ĉefe skribita, esperanto tendencas fariĝi lingvo parolata. La akceptado de la unuaj verkoj de Zamenhof kiel netuŝebla fundamento estas vera bato al la lingvista funkcio de Louis de Beaufront.

Cl.- Antaŭ la bulonja kongreso, kiam oni troviĝis antaŭ malfacilaĵo gramatika, vortara aŭ stila, oni kutimis atendi respondon de eksterulo, kaj tiu eksterulo ofte estis Louis de Beaufront, la aŭtoro de lernolibroj. Ekde 1905 oni pli kaj pli rigardas al la Fundamento. Oni komparas la dirojn de la gramatikistoj al la realeco mem de la fundamentaj tekstoj.

A.- Por Zamenhof, kiu estis la aŭtoro de la fundamentaj verkoj, tio estas vera honorigo. Por Louis de Beaufront tute ne estas la sama situacio. Li perdis grandan parton de sia prestiĝo. Estas normale, ke nekonscie li serĉu rimedon por trovi la gvidpovon.

Cl.- En aŭtuno 1907, do du jarojn post la bulonja kongreso, okaze de la kunsidoj de la Delegitaro por adopto de internacia lingvo, kie li estis komisiita defendi esperanton kaj por reprezenti ties aŭtoron Zamenhof, fakte li defendos lingvo-projekton, kiun li kaŝe kunaŭtoris sub la pseŭdonimo Ido.

A.- Ĉar li ne komprenis la kaŭzon de la socia ŝanĝo, ĉar li ne komprenis, ke esperanto eniris novan fazon de sia evoluo, li plene eraris.

Cl.- Por li esperanto ankoraŭ estis projekto. Do sufiĉis prezenti pli plaĉan projekton por allogi al si la publikon. Fakte esperanto ne plu estis lingvo-projekto. Ekde 1894, la jaro de la voĉdono kontraŭ la proponita lingva reformo, esperanto komencis fariĝi memstara idiomo, kaj en 1907, kiel skribis Hector Hodler en la unua numero de la gazeto *Esperanto*, ĝi « *fariĝis, per la literatura praktikado, vere vivanta lingvo ekzistanta per si mem ekster la aliaj lingvoj* ».

A.- Kion ne perceptis en 1907 la 52-jaraĝa pioniro Louis de Beaufront, tion tre bone sentis la 20-jaraĝa junulo Hector Hodler.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-